

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO II^a : JUNIO-JULIO 1922

6-7

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

OFICIALA ORGANO DE LA

«KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO»

Jarkotizo : 5 pesetoj

GRUPOJ ALIĜINTAJ AL K. E. F.

BARCELONA STELO, Marqués del Duero, 101	BARCELONA
NOVA SENTO, Enna, 156	BARCELONA
PACO KAJ AMO, Asturias, 1	BARCELONA
SEMO (A. E. P.), Carme, 30	BARCELONA
LA RONDO, Provença, 131	BARCELONA
ESPERANTAJ KANTISTOJ, Baix de S. Pere, 77	BARCELONA
LA METIISTO, Travessia S. Antoni, 22	BARCELONA
LUMON, Carrer Major, 36	TERRASSA
ESPERANTISTA JUNULARO,	TERRASSA
ĜERONA ESPERO, Ajuntament,	GIRONA
STUDENTA JUNECO, Seminari,	GIRONA
APLEC «ESPERANTA GRUPO», Mendizábal, 3	SABADELL
BELA ESPERO, Carretera de Vich, 41	MANRESA
NOVA SEMO, Major, 15	REUS
LABORO ESPERANTA, S. Antoni, 1 i 3	VILANOVA I GELTRÚ
ESPERANTA IDEALO, Mn. Cinto Verdaguer, STA. COLOMA DE FARNÉS	
REGENERACIO, Centre Obrer de Cultura «Floreale»	SALT
EMPORDANA EBENAJO,	ARMENTERA
ESPERANTA NESTO, «Joventut Catòlica»,	RIPOLLET
ESPERANTISTA AMIKECO, Plaça Bernardi, 10	MANLLEU
FRATECO, P. Pi i Margall, 14	VENDRELL
ESPERANTISTA KLUBO «PALMA» Misión, 5	PALMA DE MALLORCA
TARRAGONO ESPERANTA, Unió, 9	TARRAGONA



Nia devizo: *Maro estas gutaro*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administraĵo :
Carme, 30 : BARCELONA

Redaktoro : **Jaume Grau Casas**

Pri reformemo



ANTAŭ longe ni ekpensis — kaj pli kaj pli nia opinio firmiĝis — ke estas necese defendi nian lingvon kontraŭ la reformemo de kelkaj pedantaj, malsaĝaj aŭ almenaŭ senkonsciaj esperantistoj.

Kial ili pretendas enkonduki afiksojn *mis*, *io* kaj *enda*, kiuj estas tute nenecesaj ĉar jam ekzistas *mal*, *ujo* kaj *ota*? Kial ili volas trudi al la ceteraj samideanoj siajn ĝenantajn neutilajn reformojn?

Ĉu ili kredas ke ili rajtas fari tion, kaj esperas ke la uzo kaj ĝenerala akcepto de la novaj formoj sankcios ilin kaj disvastigos la famon de iliaj «geniaj» elpensintoj?

Nu, ni laŭte diru ke ni ne bezonas iliajn «plibonigojn» por pli bone uzadi la lingvon, kaj ni proklamu la rajton de la tuta esperantistaro ne plu esti ĝenata de tiaj diletantismoj.

En lingvaj aferoj, la beleco kaj la taŭgeco estas nur relativaj. Agante laŭ sia plaĉo, ĉiu el ni enkondukus reformojn. Ni estu al ni reciproke fidelaj, konservante plenan fidelecon al la komuna Fundamento de Zamenhof!

Internacia Konferenco pri Instruado de Esperanto en Lernejo Genève, 19-21. Aprilo 1922

LA PASKAJ TAGOJ

ALVENO. — TEO. — DISERVO. — AKCEPTO ĈE VIRINA LIGO. — EKSKURSO PER-
ŝIPA. — AKCEPTO ĈE DOMO DE ETULOJ DE INSTITUTO J. J. ROUSSEAU. —
PAROLADO DE PROF. D-RO PIERRE BOVET. — RESPONDO DE D-RO ED-
MOND PRIVAT.

Ĉi tiu konferenco, unika kiel la unua internacia kongreso de edukistoj ĝis nun okazinta, altiris al Genovo imponantan aron da instruistoj de Esperanto el diversaj partoj de la mondo.

Por la akcepto de la konferencanoj estis tre oportunaj aranĝoj laŭ la direkto de D-ro Edmond Privat kaj loka komitato. Akceptejoj starigis en la enirejo al bela manĝosalono de la hotelo Richemond, kie deĵoris f-ino Dubois. En tiu hotelo la plimulto el la konferencanoj loĝas aŭ manĝas kaj ĝuas bonan oportunon por interdiskutado.

Dimanĉon, la 16-an de aprilo, matene alvenis la britaj delegitoj. Ili formis la pli grandan nacian eron de la konferenco kun 29 membroj el 89 en la oficiala delegitata listo. Tiu listo montras, ke po 1 delegito enskribiĝis el Bulgarujo, Egiptujo, Finnlando, Georgio, Hungarujo, Rumanujo, Ruslando, Svedlando, kaj Ukrainujo, po 2 el Aŭstrio, Belgujo, Japanujo kaj Nederlando, po 3 el Hinujo, kaj Danujo, 5 el Ĉeĥoslovakio, 6 el Germanujo, po 7 el Francujo kaj Italujo, 12 el Svislando kaj 29 el Britujo.

Dimanĉon posttagmeze gastigis la jam alvenintajn konferencanojn la Ĝeneva grupo «Stelo» en la ĉarma parko Grange. Bedaŭrinde pro la pluvo la festeno ne estis tiel sukcesplena kiel oni esperis; sed sub bela kolonado 70 Esperantistoj gaje interkonatiĝis kaj interbabiladis kaj trinkis teon. Poste oni vizitis la ekspozicion en la Instituto J. J. Rousseau, kie oni montris lernolibrojn, fotografiaĵojn de junaj Esperantistoj en siaj kursoj, geniajn instruilojn de s-o Sevenhuysen el Haarlem kaj originalan laboron de lernantoj. Diservo okazis je 6 h. vespere en la kapelo de la Makabeoj ĉe la Katedralo. Pastro Christen, ĉefpastro de la Katedralo, bonvenigis la adorantojn, kaj dum la diservo oni kantis himnojn el la «Himnaro Esperanta» eldonita de B. E. A., kiujn s-o M. C. Butler, London, akompanis sur la orgeno. S-o W. M. Page el Edinburgo predikis laŭ la teksto «Aŭtomate (post servado) la tero produktas frukton, unue folion, poste spikon, poste plenan grenon en spiko» (Marko IV). S-o Rudolfo Horner el Ĝenevo legis el Nova Testamento.

En la vespero tre agrabla akcepto okazis ĉe la Virina Ligo por Paco kaj Libereco. F-ino Bolsch, sekretariino, alparolis la gastojn Esperante kaj angle pri la celoj de la Ligo kaj afable bonvenigis la vizitantojn. D-ro Dietterle respondis Esperante kaj s-o Page angle kaj dankis.

Je lundo matene jam alvenis la plimulto de la konferencanoj. Oni sekvis la modernan pedagogian metodon: *Unue ludi, poste ludi*. La ĉefa parto de la tago estis dediĉita al ekskurso sur la bela lago de Lemano. Bedaŭrinde, pro la daŭra pluvo oni ne povis vidi la ĉirkaŭaĵon de la lago laŭ plej bonaj aŭspicioj, sed rekompence la Esperantoj estis preskaŭ la solaj personoj en la salono, kaj bona okazo prezentis sin por interparolado prepara por la ĉefaj kunvenoj de la konferenco. En iuj rondoj instruistoj klarigis siajn metodojn, ludojn ktp., per kiuj oni lernigas Esperanton. La kompanio alvenis en Ouchy-Lausanne je tagmezo kaj iris al la Hotel d'Angleterre, fama kiel la domo, en kiu la angla poeto Byron verkis sian poemon «The Prisoner of Chillon». Tie la lokaj samideanoj afable akceptis la vizitantojn, kaj antaŭ la tagmanĝo aro da gekantistoj ĉarmis per sia muziko. Inter la manĝo, paroloj de reprezentantoj de diversaj nacioj kreis intereson.

En la vespero post la reveno al Ĝenevo rimarkinda familia akcepto okazis en la Domo de l'Etulo de la Instituto J. J. Rousseau. Post esploro de la ĉambroj, en kiuj la junaj lernantoj de la Instituto ricevas instruadon laŭ tre interesa maniero, prof. Pierre Bovet, la direktoro de la Instituto, faris paroladon tute libere kaj flue. Prof. Bovet estas fama tra la tuta mondo pro siaj pedagogiaj eksperimentoj, kaj liaj vortoj estas do aparte interesaj.

«Gesinjoroj!

Mi scias, ke Esperanto estas ilo ne nur por monda paco, sed ankaŭ por krei tiun grandan rondon familian, pri kiu kantis la fondinto de Esperanto. En tiu familio, mi devas konfesi, kaj vi certe vidis, ke mi estas tre juna membro; kaj mi esperas, ke la pli maljunaj estos tre indulgemaĵoj pri miaj eraroj. Mi devas diri al vi, kiam kaj kiel mi estas enirinta en la familion.

Kiel multaj el vi, mi estas homo tre okupata, kaj mi ne havis tempon aŭ okazon por lerni novajn lingvojn, sed feliĉe, aŭ malfeliĉe, dum la lasta tempo mi estis malsana. Ĝi estis nur negrava malsano — la gripo, eĉ mi povas diri, la gripeto; sed dum la tagoj de mia gripo mi profitis por lerni Esperanton, kaj post kvar tagoj mi havis la tre agrablan senton koni la lingvon.

Mi ankoraŭ ne povas paroli tre facile aŭ flue. Ĉi tiu estas la unua paroladeto, kiun mi faras. Sed eble estas necese, ke mi diru al vi, kio estas tiu ĉi domo, kaj kiuj estas la direktoroj de la Instituto. La Instituto de Rousseau tute ne estas Esperantista lernejo. Ĝi estas centro pri studado pri la infano kaj la edukado de infanoj. Mi kredas, ke estas tre necese koni la infanojn pli bone ol ni konas ilin hodiaŭ. Ni havas

moton: «La infanoj estu niaj instruistoj!» kaj ni havas la senton, ke estas tre necese koni la infanojn pli bone ol ni konas ilin. Tiu ĉi domo—la domo de la etuloj—akceptas ĉi tie infanojn de tri ĝis ok jaroj—kaj la infanoj, kiuj venas ĉi tien, estas gvidataj de du mirindaj instruistoj. Vi vidas, ke la infanoj ĉi tie estas tre liberaj. Ni profitis el la spertoj de d-rino Montessori kaj aliaj en diversaj landoj. La ludo ne estas, kiel oni ofte kredas, ekzerco senutila. Ĝi estas kontraŭe ekzerco tre necesa por la infano, kaj la naturo elektis tiun vojon por doni al la infano la ekzercojn por ĝiaj okuloj, ĝiaj membroj kaj ĝia voĉo. Kaj ankaŭ ni en nia lernejo devas doni al la infano la okazon por ludi. Kiel ofte en niaj lernejoj la lernejo estas sen gajeco, sen ĝojo kaj sen ludo!

Ni kredas ankoraŭ, ke, se la pedagogiaj diskutoj estas tre ofte neutilaj, tamen estas eble fari utilaj la debatojn, se oni povas mezuri la rezultojn de ĉiu instruado, de ĉiuj metodoj — mezuri la rezultojn estas la granda ideo de la scienca ekzamenado en ĉiu fako, kaj ankaŭ en nia fako estas tre necese kunigi rezultojn, kunigi faktojn.

Kiel ni renkontis la demandon pri Esperanto? Ni aŭdis pri Esperanto multajn opiniojn, kiuj ne estas bone fonditaj, kiuj estas antaŭjuĝoj, kiuj rie estas metode, science provitaj, kaj ni pensas, ke nia Instituto havas la devon rikolti precizajn faktojn por science konstati, kiu estas Esperanto, kaj kia estas ĝia influo en la lernejoj, kaj tiel ni venis al la ideo pri ĉi tiu konferenco.

Ni kredas, ke unue estas necese studi la infanon, koni ĝin kaj poste klopodi eduki ĝin. Laŭ tiu metodo oni esperas rikolti faktojn pri Esperanto en la lernejo. Vi portos al ni tiujn faktojn dum la konferenco».

D-ro Privat respondante diris, ke la parolado de prof. Bovet estas preskaŭ miraklo. Ĝis nun Esperantistoj havas la sperton, ke kiam scienculoj alproksimiĝas al la afero, tio estas por rigardi la lingvon, kaj post rigardeto diri, ke se ili estus farintaj la lingvon, ili estus farintaj ĝin pli bona. Tamen pri la plibonigoj ili ne konsentas inter si. Prof. Bovet proksimiĝis al la tasko laŭ pli bona scienca maniero. Li vidas la faktojn senpartie. Li enketas pri la faktoj mem. Li montris al ni, ke ni ne timu prezenti nian aferon tute senkaŝe kaj senpartie antaŭ la mondo. Nia lingvo kaj nia afero havas nenion por timi, sed ĉion por gajni el la scienca ekzamenado.

MARDO, 18. APRILO, 10 H. MATENE

Prof. Bovet malfermas la konferencon kaj transdonas la parolon al la Ĝenerala Sekretario de la Ligo de Nacioj, Lia Moŝto Sir Eric Drummond, kiu faris en angla lingvo jenan paroladon.

«Estimataj gesinjoroj!

Mi ne bezonas diri, kiom grandan plezuron mi havas dezirante al vi

koran bonvenon en la Sekretariejo de la Ligo de Nacioj. Ni ĝojas meti al la dispono de via konferenco la faciligon, kiun ni povas proponi al vi.

Vi venis kiel delegitoj de multaj registaroj kaj de multaj grandaj institucioj urbaj kaj lernejoj por partopreni konferencon pri la instruado de Esperanto. Kiaj povas esti la opinioj pri la valoro de Esperanto kiel oficiala helplingvo, ĉiu konsentos, ke la spirito, kiu inspiris la kunvokon de tiu konferenco, estas simila al tiu, kiu instigas la Ligon de Nacioj. Ni ĉiuj klopodas en diversaj kampoj por pli bona interkompreno kaj pli proksima kunlaborado inter la popoloj de la mondo. Estas granda idealo. Al ĝi homoj de bonvolo ĉiam donis kaj donos sindonan helpon.

Konsiderante tiun komunan celon, mi estas vere feliĉa, ke ni povis aranĝi, ke tiu konferenco okazu en la domo de la Ligo de Nacioj.

Sed ekzistas ankaŭ alia kaŭzo, kial la Sekretariaro havas specialan intereson pri via laboro. Lastan septembron, la dua kunsido de la Ligo de Nacioj decidis meti la demandon pri tutmonda instruado de Esperanto en lernejoj sur la programon de la tria kunsido okazonta la venontan aŭtunon. Estis ankaŭ decidite, ke la Sekretariaro preparu dume plenan raporton pri la spertoj jam faritaj kaj rezultatoj atingitaj.

Por tiu celo la Kunsido deziris faktaron kaj statistikojn, kaj tial ni dissendis demandaron, al kiu jam kelkaj el vi afable respondis. Mi esprimas nian sinceran dankon pro tiuj respondoj kaj la esperon, ke pliaj baldaŭ venos, ĉar ni kompreneble deziras, ke la Kunsido havu antaŭ si la tutan eblan informaron.

Mi estas certa, ke tiu konferenco metos plian lumon sur la problemon, kiun ni studas, kaj havigos al ni novan konon pri la diversaj eksperimentoj entreprenitaj de vi. Tuta tiu materialo estos tre valora por ni por plenumi nian taskon.

Sed aparte de tiu speciala vidpunkto, la suba ligilo de komuna idealo instigas min, kiel Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj esprimi al vi, estimataj gesinjoroj, mian sinceran bondeziron por la sukceso de via konferenco.»

Poste prof. Bovet en franca lingvo klarigas la celon de la konferenco, por ke la neesperantistaj ĉeestantoj komprenu la aferon pli bone. Kiel prezidanton oni elektis laŭ propono de s-o Page s-on d-ron Privat, kiu jam prezidas la en Praha starigitan komisionon por studi la aferon de Esperanto en lernejoj. Privat siaflanke proponas kiel honorprezidantojn s-ojn prof. Bovet, Sevenhuijsen kaj prof. Cart, kiuj unuanime estas elektataj. Kiel ĝeneralan sekretarion oni elektas s-on prof. W. Perrenoud el Cernier.

En la unua parolado s-o Privat dankas al la Ligo de Nacioj por la gastigo de la konferenco kaj al la Instituto J. J. Rousseau por la kunvoko de la konferenco. Li mencias, ke la nuna konferenco rezultas el la komisiono elektita en Praha: ĝia giganta laboro multe povas esti helpata per la konferenco kies ĉefa celo estu, studi kiamaniere havigi al si reciprokecon kaj

samtempecon en la internaciaj klopodoj por enkonduko de Esperanto en lernejoj. Ĉar la Esperanta afero ankoraŭ estas tre modesta, ni ne havu iluziojn. Ni ne postulu, ke la anoj de la registaroj jam nun taksu Esperanto laŭ plena valoro, antaŭ kiam ni montris al ili per saĝa kaj tute preciza maniero la faktojn, kiuj ekzistas, kaj pruvis al ili, ke Esperanto estas pli ol nur granda eksperimento. Ni estu senpartiaj kaj havu antaŭ ni nur nediskuteblajn faktojn — sen trograndigoj. Ni ĉiuj faru klopodon kaj laboru, ke la infanoj lernu la helplingvon, ke ili alproksimiĝu al ĉiuj aliaj homoj. Fine li esprimas la esperon, ke venos la tempo, kiam eble ni Esperantistoj povos helpi al la Ligo de Nacioj en ĝia alvoko al la spiritoj de la homaro.

S-ro prof. Cart nome de la Akademio, estis sendinta salutleteron, kiun oni legas.

Nun raportas :

Nicolaief (Bulgarujo) : Laŭleĝe la nedeviga instruado estas permesita en la ŝtataj mezlernejoj. Ĝis nun estas kursoj en 25 gimnazioj al 800 lernantoj.

Fridrich (Ĉeĥoslovakujo) kiel delegito de ministrejo promesas permeson de laŭvola instruado, se ekzistas sufiĉe da kompetentaj instruistoj. Jam nun Esperanto estas instruata en 15 popollernejoj al 450 lernantoj, en 3 mezlernejoj kun 350 kaj en profesia lernejo kun 40 lernantoj. Oni zorgis, ke la uzataj libroj estu oficiale aprobitaj.

Deligny (Francujo) diras, ke en Francujo nur apartaj institucioj, inter kiuj precipe la komercaj ĉambroj, instruas Esperanton, kaj raportas pri specialaj spertoj faritaj de li.

Dietterle (Germanujo) raportas tre detale pri la stato de Esperanto-instruado en Germanujo. Estus lacige nomi ĉiujn ciferojn ĉi tie. Ni nur menciui, ke Esperanto estas instruata en lernejoj de 123 urboj, kiu nombro kreskos proksimume ĝis 175 en la venonta jaro. En G. oni akcelas, ke nur kompetentaj instruistoj instruu Esperanton en la lernejoj. Precipe grava estas la ekzisto de oficiala Registara Instituto kun ŝtata subvencio.

S-ro Page (Anglujo) raportas speciale pri instruado laŭ spertoj faritaj en Eccles, kaj kiu havis bonegan sukceson. Ankaŭ en Anglujo mankas instruistoj.

S-ro Alessio (Italujo) bedaŭras, ke la ministrejoj estos favoraj al Esperanto nur, se la nacio estos pli multe interesita pri la afero. Kvankam en kelkaj komunumoj Esperanto estas instruata, la esperoj por estanta tempo ne estas tro grandaj, ĉar mankas instruistoj.

S-ro Sevenhuijsen (Nederlando) raportas, ke Esperanto estas instruata en 95 urboj de 250 instruantoj. Nur en 2 privataj lernejoj Esperanto estas deviga fako.

S-ro Rudhardt (Svisujo) raportas pri eksperimenta instruado de Esperanto al lernantoj de sepgradaj lernejoj, kaj esperas, ke la eksperimentoj estu daŭrigataj.

Kenn (Ĉinujo) parolas pri la grava intereso, kiun la ĉinoj kiel pacema

popolo havas por Esperanto. Post diversaj malprogresoj dum la monarĥista reakcio kaj dum la mondmilito nun la movado denove marŝas, kaj laŭ ordono de la ministrejo por edukado Esperanto estu instruata en ĉiuj lernejoj.

Usami (Japanujo) diras, ke — kvankam Esperanto ne jam estas instruata oficiale — tamen multaj kluboj zorgas por instruado de Esperanto. Intereson por la eŭropanoj havis la diro, ke por japanoj Esperanto estas multe pli facila ol angla lingvo, kaj ke la vortfarado en Esp. estas tre simila al tiu en japana lingvo.

Baranyai (Hungarujo) raportas, ke la ministrejo de publika instruado permesis, ke Esperanto en 3 lernejoj estu instruata fakultative.

MARDO, 18. APRILO, 15 H. POSTTGM.

F-ino Hogg (Anglujo), kiu faris la eksperimenton de Eccles, parolas detale pri la logika valoro de Esperanto, kiun ŝi nomas penslogika gimnastiko ĉe infanoj. Ili parolas aŭ verkas en Esperanto pli logike ol en gepatra lingvo, kies vortojn ili uzas pli atente post kurso en Esperanto. La studo de Esperanto tre helpas la studon de la gramatiko kaj tial plifaciligas lernadon de aliaj fremdaj lingvoj.

Schamanek (Aŭstrujo) faris la samajn spertojn, kiajn la antaŭa parolinto. Li diras, ke li en ĉiu kurso rimarkis, ke Esperanto pliprofundigas la gepatran lingvon.

Dixon (Anglujo) mencias la opinion de sia lernejestro en Eccles, ke eĉ se infanoj ne uzas Esperanton por korespondado, ĝi tute valoras la tempon uzitan por ĝia studo pro la helpo, kiun ĝi liveras ĉe la studo de la gepatrolingvaj vortoj.

Haine (Belgujo) instruis knabojn kaj diras, ke li konvinkiĝis, ke la latina lingvo tute ne estas necesa en la lernejo por instrui nacian lingvon.

Sevenhuijsen (Nederlando) raportas, ke la studo de Esperanto helpas al la nacia ortografio kaj elparolado kaj atentigas pri ĝi.

Fridrich (Ĉeĥoslovakujo) faris similaĵajn spertojn, rilate ĉeĥan lingvon, ankaŭ ĉe uzado de sufiksoj.

Pomarici (Italujo) akcentas la pedagogian valoron de l' uzo de la akuzativo en Esperanto. La studo de Esp. faciligas la distingon de samformaj, vortoj, akriĝas la mensoj kaj la cerboj kaj la observadoj.

Ledermann (Germanujo) respondas la demandojn, ĉu la lernanto ne iom post iom perdis la intereson pri aliaj fremdaj lingvoj, per: tute kontraŭe. Precipe pli kleraj lernantoj iom post iom sentas lingvan kapablecon; kaj la intereso por fremdaj lingvoj vigliĝas. La studo de Esp. havas nur unu mankon, ke la lernantoj, konstatinte la tre facilan lerneblecon de Esperanto kompare al fremdaj lingvoj, iun tagon povus diri: «Ho, oni forpelu la instruadon de fremdaj lingvoj! Kiam venos la tago, kiam oni ĝenerale enkondukos Esperanton?»

Troegel (Germanujo) parolas pri la punkto de metodo, speciale pri vortfamilioj.

Dietterle (Germanujo) spertis, ke multaj laboristoj opinias, ke ili komprenas la gepatran lingvon nur post kiam ili lernis Esperanton.

Mikkelsen (Danujo) diras, ke Esp. helpas korekti la malbonan elparoladon de la nacia lingvo.

Collinson (Anglujo) raportas pri la granda intereso, kiun junuloj havas por lingvaj demandoj.

Deligny (Francujo) konsentas kun la parolintoj kaj speciale mencias, ke la instrua valoro kaj la pedagogia estas tiel grandaj, ke, se Esp. ne estus uzata en la vivo ordinara, oni devus instrui ĝin pro ĝia pedagogia valoro.

Kennu (Ĉinujo) diras, ke Esperanto estas tiel diferenca de la ĉina lingvo, ke oni ne facile povas kompari ilin. Tamen ĉino bezonas nur du jarojn por lerni Esperanton, dum por aliaj naciaj lingvoj estas necesaj 6 — 10 jaroj. Esp. faciligas la lernadon de aliaj fremdaj lingvoj. La demandon, ĉu Esperanto estas natura lingvo, li respondas per la alia: Ĉu ekzistas vere natura lingvo en la mondo? kaj diras: Ne!

Cze (Rumanujo) ankaŭ akcentas la logikan valoron de Esp. pro ĝia bela strukturo, kian oni vane serĉas en aliaj lingvoj. Li plue mencias kelkajn metodajn spertojn faritajn de li.

Ŝinpak (Ĉinujo) diras, ke la riproĉon, ke Esperanto — ne enhavante ĉinajn radikojn — ne estas tutmonda, li povas rifuzi per la pruvo, ke la formo de Esperanto (vortfarado) estas ĉina. Ankaŭ la malfacilaĵoj rilate la elparoladon ne estas tre grandaj.

F-ino D-ro Fisher (Anglujo) opinias bone instrui Esperanton kiel bazo de modernaj lingvoj. Ŝi spertis, ke lernantoj, kiuj unue lernis Esperanton, poste pli facile lernis aliajn fremdajn lingvojn. Oni instruu bilde kaj interparole.

Haine (Belgujo), kiu havas du lingvojn kiel gepatrajn kaj du lingvojn samtempe en la lernejo, diras ke estus bone, se oni lernus nur la gepatran kaj la Esp. lingvojn. Tiel oni povus lasi la aliajn fremdajn lingvojn al specialistoj, kiuj ilin deziras.

Mikkelsen (Danujo) nomas Esp. la vera pordo al la lernado de fremdaj lingvoj.

Pomarici (Italujo) simile diras, ke la komenco de lernado por Esp. estas pli konforma al la pedagogia leĝo pri gradeco. La lernado de Esp. ofte donas al la infanoj deziron lerni aliajn lingvojn. Li ŝatus Esperanton antaŭ la latina lingvo en gimnazioj.

Kamaryt (Ĉeĥoslovakujo) konstatas, ke infanoj en lia lando, kiuj antaŭe lernis Esperanton, poste pli bone lernas francan lingvon.

Page (Anglujo) diras, ke per enkonduko de Esp. la programo de la lernejoj ne estus troŝargita, ĉar aliaj lingvoj post Esp. povus esti lernataj des pli rapide.

Hell (Ĉeĥoslovakujo) diras, ke li spertis, ke la lernado de Esp. plifaciligas la postan studadon de la naciaj lingvoj.

Beckmann (Svedujo), kiu ĝis nun ne havis tre multajn spertojn, tamen estas konvinkita, ke Esperanto enkondukita en lernejojn ne kostas unu minuton, ĉar la tempo estas rekompencita per la facileco lerni aliajn lingvojn.

Prof. Bovet (Svisujo) opinias, ke pro la multaj esceptoj ĉe la reguloj de naciaj lingvoj, lernotaj de infanoj, en ties cerboj formiĝas granda ĥaoso, el kiu tre malfacile la instruistoj povas fari ordon.

F-ino Hogg (Anglujo) raportas pri sia sperto, ke la lernado de Esperanto instigas al la lernado de aliaj modernaj lingvoj.

Fridrich (Ĉeĥoslovakujo): La Esp. lingvo helpas al mi instrui la germanan kaj francan lingvojn.

Ledermann (Germanujo) opinias necese, ke ni konvinku la instruistojn de la klasikaj lingvoj pri la profitoj gajneblaj el la instruado de Esp.

Haine (Belgujo) spertis, ke Esp. helpas multe ĉe la studado de la latina lingvo.

Rudjardt (Svisujo) raportas, ke li dum instruado de germana lingvo spertis, ke tiuj, kiuj scias Esperanton, multe pli bone progresis ol la aliaj.

Dubois (Svislando) atentis laŭ propra sperto, ke la antaŭa lernado de Esp. multe helpas ĉe la studo de fremdaj lingvoj.

Nun estas legita kaj akceptita la jena

PROpono DE D-RO BOVET.

La faktaro kunigita de la Konferenco montras, ke metoda enketo pri la rezultoj de la Esperanto-instruado en lernejoj estas tre dezirinda.

Tiu enketo devos esti farata laŭ la reguloj de eksperimenta pedagogio. Ĝi studados la demandaron proponitan por la nuna Kunveno kaj ĉefe la sekvantajn demandojn:

Ĉu Esperanto malbonigis la uzon de la patrina lingvo ĉe la lernantoj?

Ĉu Esperanto estas malhelpaĵo en la studado de fremdaj kaj klasikaj lingvoj?

Aŭ kontraŭe, ĉu la eksperimentoj de Eccles kaj Bishop Auckland estos sampruvaj en lernejoj de aliaj landoj?

Ĉu la eklernado de Esperanto faciligas poste la komprenon de la gramatiko fremdlingva?

Eksperimentoj tiaj estos diversigitaj laŭ la diverslandaj programoj, sed ĉiam kun pure scienca celo, sen iu ajn antaŭ-juĝo.

Por starigi detalan eksperimentan programon la unua konferenco elektas kiel specialan komisionon gesinjorojn Bovet, Fisher, Ledermann, Pomarici.

Ĉi tiu komisiono devos raporti al venonta Esperanta kunveno de instruistoj kaj al la Kongreso en Helsinko.

Post akcepto de la propono la marda kunveno estis fermata. La elektita komisiono poste kunvenis en speciala ĉambro.

Merkredo, 19. Aprilo, 10 h. Matene

Laŭprograme, kiel jam antaŭan tiel ankaŭ la duan tagon estas donitaj gravaj raportoj pri Esperanto kaj ĝiaj rilatoj al diversaj punktoj.

Ludvik (Ĉeĥoslovakio) akcentas la valoron de Esp. por reciproka interkonatiĝo kiel sekvo de korespondado.

Sevenhuijsen (Nederl.) diras, ke infanoj en sia lando per la rilatoj al fremdaj Esperantistoj lernis kompreni kaj ŝati fremdulojn.

Hogg (Anglujo). Laŭ ŝia sperto la infanoj mem faras rimarkojn pri la valoro de Esp. por helpi al la paco de la mondo.

Pomarici (Ital.) dubas pri tio kaj opinias necesa la influon de instruantoj por vekti abstraktajn ideojn ĉe infanoj.

Šupiňová (Ĉeĥoslovakujo) kontraŭparolas f-izon Pomarici kaj donas ekzemplojn.

D-ro Troegel (Germ.) diras, ke jam per legado de fremda literaturo, ekz. nur de proverboj, oni lernas ŝati fremdajn naciojn.

Haine (Belg.) akcentas — nomante ekzemplon — la interpacigan valoron de Esperanto.

Kenn (Ĉinujo) diras, ke ĉinaj infanoj per korespondado en Esperanto lernis ŝati fremdulojn.

Schamanek (Aŭstr.) parolas pri blinda lernantino, kiu esprimis la feliĉon donitan al ŝi per Esperanto.

D-ro Privat (Svis.) konstatas, ke en kelkaj lernejoj la infanoj mem faras rimarkigojn pri la paciga efiko de Esperanto, kaj en aliaj ne.

Hahn (Germ.) akcentas, ke instruado de Esperanto helpas ĉiun alian fakon de instruado.

Ludvik (Ĉeĥosl.) uzas Esperanton kun sukceso por instruado de la geografio.

Young (Skotl.) nomas Esperanton la plej bona rimedo krei intereson pri la geografio.

Pomarici (Ital.) diras, ke Esperanto vigligas la instruadon de geografio.

Cze (Ruman.). Korespondo kaj interŝanĝo multe helpas.

D-ro Privat (Svisl.). Estas bone, ke la instruisto gvidu la lernantojn iomete, por ke ili skribu aferojn utilajn.

Watson (Skotl.). Ĉe la infanoj oni komencu repacigi la mondon. Korespondo en Esperanto faciligas tion.

Hahn (Germ.) spertis ke per la internacia korespondado la spirita horizonto treege plivastiĝas.

Ducommun (Svisl.) opinias, ke la instruisto devas zorgi pri tio, ke la korespondado estu interesa laŭ la enhavo.

Šupiňová (Ĉeĥosl.) transdonas la salutojn de siaj lernantoj.

Sevenhuijsen (Nederl.) kolektas kaj ordigas poŝtkartojn por celoj de geografia instruado.

Ludvik (Ĉeĥosl.) rekomendas, ke la instruistoj peru forsendon de poŝtkartoj kolektitaj en unu koverto por ŝpari la sendkostojn al la infanoj.

Beckmann (Sved.). Oni zorgu, ke lernantoj havu korespondadon kun same lertaj infanoj.

Holmes (Anglujo) spertis, ke oni povas bone influi la interesojn de la geknaboj per gvidado ĉe la korespondo internacia.

Cze (Ruman.) nomas Esperanton praktika kompletigilo por la prediko.

Caldwell (Angl.) kaj Deligny (Franc.) donas konsilojn, kiamaniere mal-karigi la korespondadon por la infanoj.

Poncet (Franc.) ŝatas Esperanton kiel helpilon por lerni geografiajn nomojn.

D-ro Dietterle (Germ.) proponas kreon de centrejoj por perado de korespondo.

Jacob (U. E. A.) intencas organizi tian bultenon.

Thomson (Anglujo) donas informojn pri la Skolta Esperantista Ligo.

Drummond Page (Angl.). Kvankam la ĉefskolto Sir Rob. Baden-Powell rekomendas Esperanton, la skoltestroj ĝenerale ne ŝatas ĝin.

Bovet (Svisl.) plene aprobas la jenan

PROPONON PRI SKOLTOJ DE S-RO K. GRAHAM-THOMSON

«Ke ĉi tiu Konferenco de Geinstruistoj el 28 landoj, konstatante la grandan edukadan valoron de la Geskoltaj Movadoj de la mondo simpatias kun la nuna instruado de Esperanto inter geskoltoj kaj rekomendas, ke la estroj de la Geskoltaj Movadoj en ĉiu lando subtenu la instruadon de Esperanto inter la geskoltoj.»

La propono estas unuanime akceptita.

D-ro Privat (Svisl.) rekomendas fervoran agadon ĉe la ruĝkrucaj asocioj.

Rezolucio pri la Ruĝa Kruco, simila al tiu pri la skoltoj estas akceptita.

Laste oni legas diversajn saluttelegramojn. La oficiala delegito de la albana registaro ne ĉeestas pro malfruigo.

MERKREDO, 19. APRILO, 15 H. POSTTAGMEZE

D-ro Dietterle tre detale parolas pri la diversaj punktoj de la «Pedagogia Demandaro». Li opinias, ke manko de logika kapablo povas esti la kaŭzo por tio, ke la infanoj tute ne lernos Esperanton. Ankaŭ la vortfarado prezentas specialajn malfacilaĵojn. La daŭro de la instruado dependas ĉefe de la aĝo, en kiu oni komencas. Spertoj en Germanujo montris, ke estas plej bone instrui 12—13-jarajn geknabojn dum 2 jaroj, du horojn posemajne en la unua kaj unu horon posemajne en la dua jaro. Rekomendinde, kvan-

kam ne ĉiam eble, ŝajnas, ne komenci la lernon de alia fremda lingvo ne antaŭe lerninte Esperanton. Paroli nur Esperanton hejme kun la infano antaŭ kiam ĝi lernis gepatran lingvon ŝajnas interesa eksperimento, sed ne konsilinda por grandskala realigo. Pri metodoj de instruado: Kvankam la pure gramatika metodo ne estas rekomendinda, oni ankaŭ ne trouzu la rektan (senperan). Oni povas ankaŭ konsenti, ke oni instruu aliajn lecionojn (geografio, historio) per Esperanto. Rilate elparolado ŝajnas konsilinde fiksi la plej bonan per gramofono. Por la instruado necesas multa bona internacia legmaterialo. — Ni ne postulu ĉie kaj tuj la devigan enkondukon de Esperanto; ni postulu simple, ke ĉiu registaro koncedu al ni la eksperimenton, kie troviĝas sufiĉe da bonaj instruistoj. — Ni ne estu troigemaj, ne ĉiam parolu pri la facileco de la lingvo, kaj ankaŭ ne esperu tro multe da sukceso atingota per la Konferenco. Ĝi estas la unua, kiun verŝajne baldaŭ sekvos dua.

D-ro Privat (Svisl.) konsilas modestecon en niaj postuloj pri enkonduko de Esperanto kaj proponas, ke d-ro Dietterle interrilatu kun la Akademio pri pedagogia vortaro. Pri la lingvo mem P. diras, ke ni devas zorgi, ke ni ne tuj konsideru ĉion eŭrop-amerikan kiel necese bonan Esperanton. La demandon, ĉu post oficiala enkonduko de Esp. en lernejo estus preferinde enkonduki ĝin en kelkajn klasojn, kie estas bona Esperantisto kompetenta por instruado, aŭ instruigi pere de specialista instruisto (ne regula instruisto de la klaso)

D-ro Dietterle (Germ.) respondas, ke li preferas specialiston.

Rudhardt (Svisl.) proponas instruadon pere de specialistoj nur por la komenco.

Dixon (Angl.) konsentas Rudhardt'on.

D-ro Privat (Svisl.). Ĉiu klasestro fariĝu specialisto.

Toschi (Ital.). La instruistoj mem instruu siajn klasojn.

Ludvik (Ĉeĥosl.) diras, ke en lia lando povas instrui nur instruistoj kun atesto.

Meyer (Franc.) preferas la klasestrojn Esperantistajn por la instruado. Oni komencu la instruadon jam en la oka jaro.

Hogg (Ang.) de mallonga tempo provas, ĉu infanoj nenormalaj povas lerni Esperanton.

Schamanek (Aŭstr.) scias unu okazon de tia infano, kiu almenaŭ havis grandan intereson por Esperanto.

Rudhardt (Svisl.). Certe ĉiu normala infano povas lerni Esperanton.

Haine (Belg.) faris bonajn spertojn kun instruado al 10-jaraj infanoj, parolante pri gramatiko nur en la dua jaro.

D-ro Dietterle (Germ.) raportas pri la ekzamenoj en Germanujo.

Piatti (Italujo). Preskaŭ ĉiuj infanoj povas lerni Esperanton. Rilate la instruistojn li konsentas kun Meyer.

D-ro Privat (Svisl.) proponas kursojn por instruistoj, por ke ili estu pretaj, kiam Esp. estos deviga.

Haine (Belg.). Post oficialigo de Esperanto, kiam oni pagos la instruistojn por la scio de Esp., ili tuj kaj rapide lernos Esperanton.

D-ro Privat (Svisl.). Entuziasmo estas necesa; ni ne bazu nin sur bazo financa.

La spertoj faritaj kun deviga aŭ nedeviga instruado estas tre diversaj. Post diskutado pri ĝi

d-ro Privat (Svisl.) resumas, ke la ĝenerala deziro de la Konferenco estas, ke la registaroj se eble enkonduku instruadon devigan.

MERKREDO, 19. APRILO, 20 1/2 H. VESPERE

Publika kunsido en L'Athenée

D-ro Fisher (Angl.) parolis angle pri la utilo de Esp. en mezgradaj lernejoj.

Young (Angl.) same en unuagradaj lernejoj.

Sekvis diversaj paroladetoj en Esp. de diversnaciaj delegitoj por ke la aŭskultantoj aŭdu la sonon de la lingvo.

D-ro Privat (Svisl.) parolis ĝenerale pri la elementoj de la Esperanta gramatiko.

Prof. Collinson (Angl.) raportas pri fondo en Liverpool de Asocio de Esp. instruistoj, kiuj per interŝanĝo de ideoj konstatis, ke Esp. estas facile lernebla, multe helpas al la studado de aliaj lingvoj, lernigas pli bonan uzon de la propra lingvo kaj estas logiko aplikata. Laste la studo de Esp. naskas ĝeneralan intereson pri la homaro kaj riĉigas la scion pri la geografio.

MERKREDO, 19. APRILO, 22.15 H. VESPERE

okazis familia akcepto en salonaro de l'Athenée per d-ro Privat, kiun multaj ĉeestis.

ĴAUDO, 20. APRILO, 10 H. MATENE

Unue estas pritraktita la parlamenta Demandaro, kiu enhavas jenajn 10 punktojn:

PARLAMENTA DEMANDARO

1. Ĉu Esperanto estas instruata en via lando kiel eksperimento aŭ pro definitiva decido?
2. Kiu decidis la aferon?
3. Kiu proponis?
4. Kiu apogis?

5. Kia estas la rolo de la Nacia Parlamento en tiu rilato?
6. Kia estas la rolo de provinca konsilantaro?
7. Kia estas la rolo de urba aŭtoritato?
8. Ĉu la koncerna aŭtoritato provis ion por certigi reciprokecon eksterlande?
9. Ĉu reciprokeco estis aludita dum la diskutado?
10. Kiu povo en via lando rajtas trakti pri reciprokeco?

Post pli malpli longaj raportoj de la diversnaciaj delegitoj

D-ro Privat (Svisl.) resumas: Unuflanke, oni povas en kelkaj landoj komenci tuj la instruadon de Esp. kiel elektebla temo de kelkaj aŭtoritatoj. La registaro povas permesi tion. Tio estas la unua ŝtupo. Poste oni povas ataki la parlamentojn, kiuj povas plidefinitivi la aferon. Pri reciprokeco tiam estas du eblajoj. Unue, la Ministrejo devas enketi mem rekte en aliajn landojn al la tieaj Ministrejoj. Li konsilas, ke oni instigu la Ministrejojn tion peti. Due, pri la parlamenta agado kaj la Ligo de Nacioj. Pri tio estis elektita en Praha Komisiono, el kio parte rezultis la nuna konferenco.

Kamaryt (Ĉeĥosl.) raportas pri la agado de la Komisiono kaj la cirkonstancoj, kiuj okazigis la Konferencon. Ĝis nun la Konferenco aŭdis faktojn. Nun ni devas konsideri, kiel labori por la estonteco. La propagando parlamenta devas komenciĝi internacie, kio nun estas pli facila ol antaŭe, ĉar ekzistas Ligo de Nacioj. La laboro farita ĝis nun rilate la L. d. N. estas vere modela, kaj ni devas tion danki al s-o d-ro Privat.

D-ro Privat (Svisl.) raportas pri la favora al Esp. opinio de d-ro Beneš. Poste li prezentas jenan proponon:

«La Konferenco decidus konstantigi la Komisionon elektitan en Praha, kaj starigi internacian centron dokumentan kaj agadan pri Esperanto en lernejoj. La estraro de la Komisiono organizu tiun centron sub nomo Oficejo aŭ Instituto kaj decidu provizore pri la loko».

Klarige li aldonas, ke la Komisiono devas sin kompletigi post korespondo kun la naciaj Societoj. Ĝis tiam oni povas konsideri, ke la estroj de la naciaj societoj ĉi tie estu konsidereblaj kiel komisionanoj. La estraro havu la taskon formi la komisionon laŭ tiu principo.

La propono estas unuanime akceptita.

Post interesa diskuto oni akceptas ankaŭ proponon de Czubrynski (Polujo), laŭ kiu la naciaj societoj sin turnu al sia nacia parlamento kun la propono, ke la registaro enmetu Esperanton kiel internacian helpan lingvon en la programon de la lernejoj de la lando, kun la rezervo, ke aliaj registaroj ankaŭ tion faros.

Oni nun revenas al la «Propono pri Centro».

D-ro Privat (Svisl.) diras, ke oni petos la L. d. N. pri protektado. Se la peto estus rifuzita, oni povus daŭrigi kaj plifirmigi la rilatojn al la Instituto J. J. Rousseau kaj peti ties moralan subtenadon. Oni ankaŭ sin povas turni al grandaj institucioj kiel Ruĝa Kruco.

La propono, ke la centro restas en Genève pro la interrilatoj kun la L. d. N., estas unuanime konsentita.

Poste oni fiksas la tekstojn de kelkaj akordoj, kiuj eventuale estu proponotaj al interesitaj ŝtatoj aŭ edukaj aŭtoritatoj.

Post ricevo kaj forsendo de diversaj telegramoj i. a. al la konferenco en Ĉenovo oni fermis la kunvenon.

ĴAUDO, 20. APRILO, 15 H. POSTTAGMEZE

D-ro Privat (Svisl.) anoncas la eldonon de libro pri G. Williams, la fondinto de K. U. J. V. (Y. M. C. A.) en Esperanto, kiun eldonis la Tutmonda Alianco de K. U. J. V.

Núñez (Hispl.) proponas

«Ke ĉi tiu konferenco de geinstruistoj, konstatante la grandan praktikan valoron de Esperanto, simpatias kun la nuna instruado de la internacia lingvo inter policianoj por helpo al la fremdaj vojaĝantoj sur stratoj kaj rekomendas, ke la poliestroj en ĉiu lando subtenu ĝian instruadon».

La propono estas unuanime akceptita.

Kenn (Ĉinujo) prezentas jenan rezolucion:

LA ORGANIZO DE «INTERNACIA ESPERANTO ELDONANTA ASOCIÓ»

Por ke Esperanto progresu, estas necese, ke ĝia uzado praktike disvastiĝu, sed tio ne rezultus, esceptinte ke Esperanta literaturo havus grandan influon en la politika, komerca kaj intelekta rondoj. Por atingi tiun celon, estas necese por la komenco organizi «Internacian Esperantan Eldonan Asocion». Jen estas kelkaj ideoj:

La Asocio estos fondata laŭ la komuna konsento de ĉiuj landoj kaj enhavos por siaj membroj ĉiujn spertajn Esperantistojn kaj Esperantistajn aprobantojn.

La «Eldona fako» fariĝos la plej granda parto de la Asocio kaj laboros por traduki ĉiujn diverslingvajn verkaĵojn, sciencajn kaj literaturajn, kiuj estas famaj aŭ noveldonitaj.

La Asocio devos havi grandan presejon. Ĉiuj eldonitaĵoj estos vendotaj malkare, ne por profito, sed por Esperantismo.

Por proviza kaj subtenanta mono ĉiuj delegitoj de la Konferenco petu subvencion de la registaro kaj de la popolo de sia lando.

Se ĉi tiu ideo estos akceptita, bonvolu organizi specialan komisionon por la plano de la Asocio.

Oni elektis komisionon por pritrakti tiun ĉi demandon, kies prezidanto estas s-o Rollet de l'Isle, kaj al kiu apartenas i. a. d-ro Dietterle kaj Kenn.

Kenn (Ĉinujo) plue prezentis deziresprimon pri Esperanto en elementa lernejo, sed reprenis ĝin laŭ peto de d-ro Privat.

Tajnokinnen (Finnl.) salutas la Konferencon kaj estas speciale dankita de

D-ro Privat (Svisl.), ĉar Finnlando estas la unua ŝtato en la mondo, kiu per parlamenta baloto decidis helpi la Esperantan movadon. P. petas, ke S-ro Tajnokinnen transdonu la salutojn de la Konferenco al la Finlanda Registaro.

Plue li dankas S-ron Fujisaŭa por la raporto pri la funkciado de la L. d. N., kiu estos donata al ĉiu Konferencano, kaj ankaŭ al la kunhelpintoj, kiuj skribis la multajn dokumentojn. Fine li gratulas la rondeton Esperantistan en la Oficejo de la L. d. N. kaj pri ĝia tre interesa gazeto «Nova Taĝigo».

Page (Angl.) prezentas tekston de manifesto al la instruistaro de la tuta mondo. Pri ĝi oni detale diskutis kaj fine akceptis la tekston, kiun ni publikigos. Samtempe estas esprimita la deziro, ke la teksto el Esperanto estu tradukota en naciajn lingvojn kaj transdonota al naciaj gazetoj.

Bovet (Svisl.) raportas, ke la venonta kongreso pri morala edukado (fine de julio en Genève) uzos Esperanton kiel oficialan lingvon.

Alessio (Ital.) esprimas al la L. d. N. la dankon de la Konferenco por la gastigo.

Page (Angl.) same al la oficistoj, kiuj laboris por la Konferenco.

D-ro Dietterle (Germ.) akcentas la eminentecon de D-ro Privat kiel parolisto kaj prezidanto, same energia kaj bonhumora kaj aminda homo kaj samideano. Per manpremo li esprimas al li la dankon de la Konferenco.

D-ro Privat (Svisl.) korege dankas al ĉiuj, kiuj helpis la sukceson de la Konferenco. Li esperas, ke el ĝi ankaŭ niaj internaciaj kongresoj multe lernus rilate ordon kaj seriozecon. Certe ankaŭ la Konferenco ne restos sen impreso al la registaroj; kaj ili konvinkigos, kaj ne ekzistus ia ajn risiko ĉe la enkonduko de Esp. en lernejojn, eĉ se Esp. ne sukcesus kiel internacia lingvo. Plue li memoris je nia Majstro kaj je Hodler, al kies honoro la ĉeestantoj leviĝis. Nun li admonis la kunlaborintojn, hejme daŭrigi seriozan laboron por nia afero. Ni laboru, ke niaj infanoj havu feliĉan estonton, ke ili lernu servi al la homoj kaj ne malutili, ke ili metu sian bataleman instinkton, metu sin al la servo ne de la milito, sed de la paco!

Feliĉan revenon al viaj hejmoj kaj denove koran dankon!

FINO DE LA KONFERENCO

(La raporto estas mallongigo el laŭvorta stenografia raporto farita de S-ro M. C. Butler laŭ la sistemo «Raporta Stenografio», kies 5^{an} Esperantan eldonon oni ĵus eldonis en Anglujo).

Ni eltiris ĉi tiun interesan raporton el la bonega ĉiusemajna ĵurnalo «Esperanto Triumfonta», kiun ni rekomendas al tiuj dezirantaj informiĝi pri la monda movado esperantista.

El la Lingva Akademio



ri ricevis la plenan liston de la oficialaj radikoj de Esperanto, laŭ la *Universala Vortaro* kaj la 3 aldonoj. La sama *Vortaro*, tipografie presita, baldaŭ estos aĉetebla.

Ankaŭ ni ricevis «Korekto de la eraraj tradukoj en *Universala Vortaro*» (Franca Parto), redaktita de Prof. Th. Cart.

La angla, germana, pola kaj rusa partoj, aprobitaj, kiel la franca, de la L. K. (1914), aperos post kelkaj semajnoj.

GRAVA DECIDO

Laŭ peto al li farita de la Prezidanto de la Akademio, la Akademiano Prof. E. Grosjean-Maupin, Direktoro de la Sekcio por la Komuna Vortaro, verkis tute objektivan kaj pure sciencan raporton pri la landnomoj.

Ekzameninte ses diversajn proponojn por solvi la demandon pri landnomoj, li alvenas al la jena Konkludo:

«La raporto sufiĉe pravas, ke neniu sistemo estas plene rekomendinda el la *teoria* vidpunkto... Pro tiu ĉi motivo, oni devas konsideri nur la *praktikan* vidpunkton... El tiu ĉi vidpunkto la fideleco al la ĝis nun ĝenerale akceptita tradicio estas pli sendanĝera ol ia ajn provo...»

Komunikita la raporto kun preciza demandaro, la Akademianoj voĉdonis, kaj al la demando: Ĉu konsilinda la *simpla* fideleco al la Fundamenta kaj tradicia - uj?* la Akademio per 9 voĉoj kontraŭ 3 respondis: jes.

Do per la plimulto da voĉoj la Akademio decidis la revenon en la landnomoj al la tradicia - uj.

Kelkaj gazetoj, volonte obeante tiun decidon, ĉesigas de nun la uzadon de la formo: - io.

«Kataluna Esperantisto» ĝoje konstatas, ke ĝi ne deflankiĝis de la bona vojo, kaj esprimas, unu fojon ankoraŭ, sian absolutan fidelecon al la Fundamento de Esperanto, sola vivgarantio de la genia verko de Zamenhof.

* Tio, kompreneble, laŭ la Zamenhofsia sistemo, kiu ne koncernas la landojn, kies nomo finiĝas per lando, aŭ kiuj kuŝas ekster Eŭropo kaj Azio; Irlando, Kanado, Peruo, Maroko, k. t. p.

La amuletoj kontraŭ la malbona rigardo



LA superstiĉo pri la malbona rigardo estas ĝenerale disvastigita en Bulgarujo, sed ĝi perdis, kompare al aliaj eŭropaj popoloj, multe da sia tuteco kaj komplikeco. Tion pruvas la malgrava kvanto da kolektitaj kaj enskribitaj materialoj pri la singardo kaj jeĵuro kontraŭ la malbona rigardo.

Kiel plej efika rimedo por jeĵuri la influon de la malbona rigardo estas rekomendata la salivo. Estas kutimo ĉie, en Bulgarujo kaj en Makedonio kiam oni volas antaŭgardi malgrandan infanon aŭ alian aĵon kontraŭ la influo de l' malbona rigardo, kraĉi sur ĝin prononcante la malbenon: «La malbona rigardo ne atingu ĝin!» Ofte, por tiu ĉi celo, la patrino frotas la okulojn de sia infano per fingroj malsekigitaj de salivo, aŭ pasigas sian langon sur ĝian frunton. Oni detenas sin diri bonajn aferojn aŭ laŭdajn parolojn pri infanoj, por ne permesi al la malbona rigardo halti sur ili. La aĝuloj sin ŝirmas kontraŭ tio metante iun aĵon de sia vesto ĉu turnite ĉu renverse. Oni portas ankaŭ diversajn amuletojn kun ŝirma celo. La unuaj donacoj, kiujn la novenaskitoj ricevas, prezentas ĝuste similajn amuletojn, ekzemple: malgrandajn metalkrucojn, lignajn aŭ ostajn, orajn aŭ arĝentajn monerojn, malgrandajn ostajn aŭ metalajn ikonojn (sanktajn figurojn). La patrinoj alligas tiujn ĉi amuletojn al la ĉapeto de l' infano por deturni la malbonan rigardon. Ofte, flanke de tiuj amuletoj, oni alligas ankaŭ aliajn objektojn: kolorajn butonojn, vitrajn perlojn, sonoriletojn, malplenan avelon, talpan kruron, ranan oston, harbuklon, ktp. Sed, flanke de ĉiuj ĉi tiuj objektoj, aparta loko estas rezervita al la ajlo, kiel cetere ĉie, kie la kredo je la malbona rigardo ankoraŭ ekzistas. La pikanta odoro de la ajlo estas utiligata en kelkaj regionoj, eĉ de la aĝuloj, kiel ŝirmilo. Oni alkroĉas ajlon ankaŭ al dombestoj same kiel al la pordoj, fenestroj, plektobariloj ktp. La knabinoj kaj junedzinoj florornamas sin per kalendulo (calendula officinalis), peonio (paeonia officinalis), ruto (ruta graveolens) k. a., eĉ per artefaritaj floroj por jeĵuri la danĝeron de la malbona rigardo; ili portas ankaŭ sur la kapo pendadojn de cervkorno aŭ de majskarabaj flugiloj. Tiu ĉi pli speciala amuleto konsistas el la supraj flugiloj de majskarabo apartenanta al la familio de la Karabidoj (Carabidae), speco de la Procerus'o. Tiuj ĉi insektoj, atakitaj de la malamiko, ĵetas venenan fluidaĵon, kiu, se ĝi falas en la homan okulon, kaŭzas fortan inflamon daŭrantan du-tri tagojn. Tiu ĉi propreco klarigas ĝuste la uzon de la amuleto. La kornoj, dentoj, ungoj kaj hufoj de la bestoj, estante naturaj defendiloj, estas utiligataj ĉie kontraŭ la malbona rigardo.

Oni portas same sur la brusto, sub la ĉemizoj, malgrandan *muska'* on (turka vorto), enhavantan ian preĝon aŭ relikvon, kiuj estas nomataj *kamajli*

(turka vorto). Tio ĉi estas grandparte arĝentaj skatoletoj, laŭ formo triangula, kvadrata, ronda aŭ cilindra, forĝitaj kaj ornamitaj per bildoj de sanktuloj aŭ de vegetaĵoj; ili estas alligataj al ĉeneto kaj portataj sur la vestoj. Tiuj ĉi amuletoj rememorigas nome la *bulla* de la Romanoj por la malgrandaj infanoj.

Ĉiam cele de antaŭgardo kontraŭ la malbona rigardo, oni portas ankaŭ arĝentajn medalojn, prezentantajn la bildon de Kristo, tiun de Kristo sur la baptoakvo, la okulon de la dia Providenco aŭ malgrandajn ikonojn (la Sankta Virgulino portanta Jesuon, la Anunĉiaco, k. a.). Tie ĉi devas esti notataj ankaŭ la ĉirkaŭkoloj — amuletoj, konsistantaj el arĝentaj ĉenetoj, kovritaj de malgrandaj objektoj ĉiuspecaj en miniaturo, kiel: pistoloj, jataĝoj, sagoj, lupo, bastonego, kruĉo, bufo, virina hejmsuo, tondilo, hakilo, hundo, kuleroj, plugilo, infana glitveturilo, ŝtuparo, hombrako, drako, sciuro, k. t. p. La funkcio de ĉiu objekto en la ordinara vivo klarigas ĝian signifon kiel amuleto. La prototipo de tiuj ĉi ĉirkaŭkoloj estas sendube la *crepundia* de la Romanoj.

Granda nombro da ornamaĵoj, ĝenerale ordinaraj, estas portataj kiel amuletoj. Tiuj ĉi ornamaĵoj havas nenian simolan signon, manifestantan la celon por kiu ili estas portataj, sed ili aludas silente la ideon de la amuleto; ekz. bronza zombukoj havantaj formon de manoj metitaj unu kontraŭ la alia, sur ili birdo simboliganta la Sanktan Spiriton; arĝentaj zombukoj kun bildo de drako; arĝentaj bukoj en filigrano kun heksagramo en la mezo. Ĝenerale ĉiuj zombukoj, kies tasko estas ŝirmi kaj gardi la ventran regionon, centron de la homa vivo, laŭ la maljunaj, havas pli-malpli la signifon de amuleto kontraŭ la malbona rigardo. La amuletoj destinitaj speciale por la bestoj estas pli maloftaj. Estas konata ekzemplero konsistigita de du apraj dentoj en formo de kvaronluno, ligitaj per arĝenta ringo. Tiu ĉi formo, rememoriganta la pozicion de du kornoj metitaj unu kontraŭ la alia, estas renkontata ofte en la amuletoj kontraŭ la malbona rigardo. La simbola signifo de la dentoj kaj de la kornoj estas evidenta. Kranio provizita je du kornoj estas ankaŭ certa rimedo por ŝirmi kontraŭ la malbona rigardo la fruktĝardenojn kaj la semaĵojn.

Estas kompreneble, ke la amuletoj cititaj ĉi-supre ne prezentas ĉiujn specojn de amuletoj kontraŭ la malbona rigardo ankoraŭ en uzo ĉe la bulgara popolo. Ĉiukaze, la diverseco de la amuletoj ne estas tiel granda en Bulgarujo, kiel ĉe aliaj popoloj. Tiu ĉi cirkonstanco, same kiel la fakto, ke malmulte da kutimoj kaj tradicioj estas konservitaj ĝis nun, kondukas nin al la penso, ke proporcie kun la intelekta leviĝo de la bulgara popolo, tiu ĉi superstiĉo malaperos multe pli rapide ĉe ni ol ĉe multaj aliaj pli civilizitaj popoloj.

IVAN H. KRESTANOFF

La Atlantido - Kanto Sesa

(Fragmento)

H E S P E R O

La Atlantoj supreniras sur monto starigi grandan konstruaĵon
taŭgontan kiel rifuĝejo dum la nova diluvo. Hespero iras ren-
konte al la heroo. Ŝi rakontas al li sian amadon kaj edziniĝon je
Atlas, siajn ĉagrenojn kaj la malfeliĉon de sia vivo.

— Ni iru, ne plendu; mi ankaŭ patrujon
forlasis, — respondas Alcides al ŝi, —
ne aŭdis vi laŭdi la belan Grekujon?
mi ĝin, se edzece
al mi vi kuniĝos, forlasos pro vi.

Ĉielo min gvidas laŭ ŝip', ke mi iru
vin savi el drono, vin porti al bord'
feliĉa, sur kiu vi plu ne sopiru
je viaj estintaj
arbaroj el cedroj, falĉitaj de l' Mort'.

Atendas vin virgaj la kampoj iberaj;
ter' tie pli verda, pli blua la spac';
refloros en ili la rozoj Hesperaj
kaj semos mi tie,
krom art' de l' milito, la ludojn de l' pac'.

Teruras vin klabo, — de monstroj ekstermo?
Simile, ne estas kor' mia el fer';
mi aŭdis, ke vokas vi min, dum malfermo
de Kalpe la monto;
alkuris mi savi tuj vin el danĝer'.

Simile falantan de monto riveron,
 mi arbojn elŝiras de forta radik';
 mi rompas, frakasas ilian fieron;
 kaj junkojn, floretojn
 malfortajn dorlotas mi kiel amik'.

Do, kia mi estas? Centaŭroj min konas;
 min vidi evitas leon' pro timem';
 mi turojn fierajn terure imponas;
 kaj eĉ, se kolere
 mi supron surpaŝas, krutmont' tremas mem.

Mi estas vent', kiu arbarojn tremigas;
 mi — fulm' fluiginta akvegon sur ter';
 mi Hidrojn sufokis, mi aglojn haltigas;
 por tiuj — Alcides,
 por vi — laŭr' fleksiĝa, ho milda heder'.

Sed akvo jam kuŝas sur val' kaj ebena;
 ni iru, ĝi staros tuj super montar';
 forlasu ni landon, pro dia malbeno
 rompите ĵetatan,
 Hespero belega, en fundon de l' mar'.

Herkuleso prenas ŝin kiel edzinon kaj tra l' ondoj revenas al Gades surdorse portante ŝin, senespere adiaŭntan la ŝafidojn kaj birdarojn, siajn estintajn ĝuojn. La Titanoj rapidas starigi sian konstruaĵon. Kiam ĝi estas preskaŭ preta, ili rimarkas la forkuron de sia patrino kun la greko; kaj ĵetante al li la pecojn de la ciklopa verko, persekutas lin. Li forkuras per grandaj paŝoj, ĉe la ŝtonhajlado kaj ĥaoso de l' akvoj. Teruraj vizioj de Hespero en la mallumo. Fulmo bruligas la grandan urbon de l' Atlantoj, kaj ili, gvidite de ĝia lumo, baldaŭ atingas Herkuleson.

Katalune verkis JACINTO VERDAGUER

Tradukis JOSEP GRAU CASAS

Bibliografio

ESSAI SUR LA DÉRIVATION COMPARÉE DANS LES LANGUES NATURELLES ET ARTIFICIELLES, par Camille Aymonier. Eldonis : Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy, Paris, 1921. Prezo : 5 fr.

Volumo kun 132 paĝoj, en kiu la eminenta lingvisto faras interesan studon pri la derivado de vortoj en lingvoj franca kaj esperanta. El multaj plej diversaj komparaĵoj, oni eltiras la konkludon pri plena facileco kaj taŭgeco de Esperanto.

Ĉi tiu libro, bonega por la propagando de nia lingvo ĉe inteligentuloj, enhavas ankaŭ aldonon pri la gramatika karaktero de la esperantaj radikoj kaj tre zorge verkitan antaŭparolon.

Pri la forta konvinka valoro de tiu rimarkinda verko, nerefutebla pledo por Esperanto, donas ideon la jenaj energiaj vortoj ĉe la komenco de la Antaŭparolo : «Toute discussion sur les principes, sur la possibilité d' une langue artificielle est oiseuse. L' Esperanto est un fait. On ne discute pas un fait, on le constate; on l' analyse et on l' explique si on le veut». Fine ni rekomendas al ĉiuj propagandistoj de nia lingvo la akiron de la libro de Prof. Aymonier.

BONHUMORAJ RAKONTOJ DE NUNTEMPAJ VERKISTOJ EL LA HUNGARA LITERATURO. — Eldonis : «Per Esperanto al la tutmondo», Budapeŝt, 1921.

Malgranda broŝuro kun sep rakontoj vere bonhumoraj, tradukitaj de diversaj samideanoj. Kvankam la stilo estas ĝenerale tre bona, tiu ĉi verketo enhavas kelkajn nekorektaĵojn aŭ strangaĵojn : «... ĉar li sentas, ke li jam pluen iris, ol kiam li komencis»; «ĉi tiel»; «... li bone sciis, ke mia plej ŝatata manĝaĵo estas la karmo kaj se per nenio, sed per tio li povas aliigi mian decidon»; «Alitage mi ne tagmanĝis, nur tial, por ke mi povu manĝi pli multe da karmo...». Ĉi tiu verko estas rekomendita de «Esperantista Literatura Asocio».

ELEMENTAR = LEHRBUCH ZUR GRÜNDLICHEN ERLERNUNG DER INTERNATIONALEN HILFSSPRACHE ESPERANTO, von Guido Otto. Eldonis : Esperanto Verlag Friedrich Ellersiek, Wissmannstrasse 46, Berlin, 1921. Prezo : 12 Mr.

Elementa lernolibro de Esperanto, 132 - paĝa, kun gravuraĵoj, por germanlingvanoj. Ĝi enhavas 15 lecionojn kun konversaciaj ekzercoj, literaturajn pecojn, la Fundamenton kaj vortarojn Esperantan-Germanan kaj Germanan-Esperantan. De tiu lernolibro, kiu ĝuas merititan famon en Germanujo, estas jam eldonitaj 30.000 ekzempleroj.

ELEKTITAJ VERSAĴOJ, de K. D. Balmont. Tradukis el la rusa lingvo N. V. Nekrasov. Eldono de Hersona Esperantista Societo, Xepcoh, 1921.

Kolekto de 10 belegaj poezioj tradukitaj per tre korekta stilo, riĉaj rimoj kaj bonega ritmo. Specialan emocion vekas la poezioj «Ĉe maro nokte», «Morto, eklulu vi min» kaj la jena «Kial?» — Ho Di' Sinjor', atentu mian ploran penson, — Vin preĝas mi en ombro de vesper'. — Por kio donis vi al mi neteran menson — Kaj min alforĝis al la ter'? — Kun vi parolas mi tra denso de l' jarmiloj, — Al vi mi diras, ho Kreint,' — Ke Patron nian vokas ni, trompitaj filoj, — Kaj serĉas vin en labirint'. — Se nur momenton klare sonus voĉo via, — Mi ĝojus al helec' de l' tag', — Sed vivo, amo, morto kaj objekto ĉia — Misteraj estas por imag'. — Vi estas granda, Di', sed via granda mondo — Silentas muta, kiel vi, — Kaj dum jarmiloj longaj restas sen respondo — Petkrio nia: «Kial, Di'?»

DEVOJ DE LA HOMO, Giuseppe Mazzini. El la itala lingvo tradukis Mikaelo Arabeno. Eldonis: Laborista Esperanto-Grupo, Via S. Luca, 4-2, Genova, 1922. (Unua eldono: 10.000 ekz.)

Volumo 164-paĝa, kiun, laŭ iniciato de la Laborista E. Grupo kaj dank' al malavaraj donacintoj, la Urbo Ĝenovo prezentis al Delegitoj de la Ĝenova Konferenco, kaj disdonas tra la mondo por konigi la doktrinojn de la fama itala apostolo Mazzini, progresema homo, en kies verko spiras la interna ideo de Esperantismo. La enhavo konsistas el la jenaj ĉapitroj: I — Al la italaj laboristoj; II — Dio; III — La leĝo; IV — Devoj al la Homaro; V — Devoj al la Patrujo; VI — Devoj al la Familio; VII — Devoj al si mem; VIII — Libereco; IX — Edukiteco; X — Asocio-Progreso; XI — Ekonomia demando; kun antaŭparolo kaj konkludo. Tiu verko estas tre leginda, kvankam oni tuj rimarkas ke ĝi estas el la jaro 1860, pro la ideologia miksigo kiu kontrastas kun la nuntempaj vidpunktoj. Cetere, oni sentas korbati noblan kaj demokratan spiriton ĉe multaj el ĝiaj belaj paĝoj. La traduko estas bonega, kun stilo flua kaj eleganta.

KIO ESTAS LA LEIPZIG-A FOIRO? Eldonis: Messamt für die Mustermessen in Leipzig (Esperanto-Fako), Markt 4, Leipzig, 1922.

Bela broŝuro lukse presita, kun gravuraĵoj, pri la internacia Leipziga foiro kaj la karaktero de Leipzig kiel foirurbo. La tuta teksto estas en Esperanto.

J. G. C.



XIV^a Universala Kongreso de Esperanto en Helsinki (Finnlando)

8-16 Aŭgusto 1922

La troa longeco de la ricevitaj komunikoj malpermesas al ni presi ilin. Cetere, la malmultaj katalunaj samideanoj, kiuj intencas ĉeesti la venontan Universalan Kongreson, sciigas rekte pri ĉiuj detaloj.

KONGRESDATO : Kaŭze de tio, ke la Finna Vaporŝipa Kompanio fiksas tute novan veturplanon por la venonta somero, la L. K. K. estis devigata ŝanĝi la daton de la Kongreso. Ĝi okazos la 8 - 16 de Aŭgusto 1922.

PROTEKTANTO DE LA KONGRESO : La prezidanto de la Respubliko Finnlando akceptis la XIV Universalan Kongreson de Esperanto sub sian altan protekton.

OFICIALAN INFORMON pri la Kongreso sendis la Finnlanda ministerio por eksterlandaj aferoj per la Finnlandaj legacioj al la eksterlandaj registaroj por diskonigo al la interesatoj.

FAKAJ KUNSIDOJ : Pacifistoj, Reprezentantoj de Specimenaj Foiroj, Vegetaranoj, Sciencistoj, Filatelistoj, Abstinuloj, Studentoj, Liberpensuloj, Poŝtistoj, Fervojistoj, Instruistoj, Katolikoj, Inĝenieroj, Komercistoj, Stenografistoj kaj Ĵurnalistoj.

ALIĜINTOJ : Ĝis 31 Majo aliĝis 636 samideanoj el 21 ŝtatoj kaj 5 kontinentoj.

En la proksima numero (Aŭgusto-Septembro) aperos la

ALVOKO AL LA

IX^a INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

kaj detalaj sciigoj pri la

X^a KONGRESO DE K. E. F.

okazonta en Manresa, dum Pasko de 1923.

Presejo J. Vinyals, Plaça Constitució, 6 : BARCELONA (Sarríá)

ESPERANTAJ GAZETOJ

interŝanĝe ricevitaj de «Kataluna Esperantisto», publike legeblaj ĉe la legoĉambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

- | | |
|--|--------------------------------------|
| Egipta Esperantisto, Aleksandrio | Nova Tempo, Wien |
| Le Monde Espérantiste, Paris | Literaturo, Wolwyn Garden City |
| Esperanto-Praktiko, Berlin | Bulgara Esperantisto, Sofia |
| Belga Esperantisto, Gand | Ladina Patrujo, Bologna |
| La Marto, Haida | The British Esperantist, London |
| La Semisto, Sabadell | Holanda Esperantisto, Haag |
| Germana Esperantisto, Dresden | Libero, Kioto |
| Hispana Esperantisto, Madrid | Amerika Esperantisto, Boston |
| Katolika Mondo, Graz | Espero Teozofia, Praha |
| Espero Katolika, Udenhout | L'Esperanto, S. Vito al Tagliamento |
| Kristana Espero, Laihia | La Revuo Orienta, Tokio |
| Verda Utopio, Osaka | Arguso, Meksiko |
| La Progreso, Plzen | Brazila Esperantisto, Rio de Janeiro |
| Esperanta Finnlando, Helsingfors | Oficiala Gazeto Esperantista, Paris |
| La Esperantisto, Wien | Ĉeĥoslovaka Gazeto, Praha |
| La Laborista Esperantisto, Hannover | Nova Eŭropo, Praha |
| Nova Tagiĝo, Genève | Brazila Vivo, Fortaleza-Ceará |
| Hungara Esperantisto, Szeged | Agitanto, Kronstadt |
| Esperanto Triumfonta, Köln | Bizantio, Konstantinopolo |
| Bulletin de la Société Française pour
la propagation de l' Esperanto, Paris | La Espero, Stockholm |
| Internacia Pedagogia Revuo, Antwerpen | Sennaciĉa Revuo, Paris |
| Litova Stelo, Kaunas | Esperanto (U. E. A.), Genève |
| France-Esperanto, Paris | La Interŝanĝo, Béziers |
| Informa Bulteno de B. E. S., Barcelona | La Eklezia Revuo, Huddersfield |
| Export Esperantist, Chicago | La Verda Ombro, Taihoku |



LEIPZIG-A FOIRO

La ĝenerala internacia Foiro
de Germanujo

La unua kaj plej granda Foiro de la mondo.
Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj.

Ĝenerala Specimenfoiro kun Foiroj
por Tekniko kaj Konstrufako

Aŭtuna Foiro 1922 de la 27a de aŭgusto ĝis
2a de septembro:

Printempa Foiro 1923 de la 4a ĝis 10a de marto.



Informojn donas kaj aliĝojn akceptas la Foiroŝicejo
por la Specimenfoiroj en Leipzig:

MESSAMI FÜR DIE MUSTERMESSEN
IN LEIPZIG

